ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

N-ro 2 ⋆ 28. Julio 1920 | Jurnalo internacia, universala, sendependa eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.) | Prezo 1½ Resp.-Kup.

Belega Budapest.



Ĉi-supra bildo el la Hungara ĉefurbo reprezentas la brilajn bordojn de la *Danubo* vidatajn de *Gellért*-Monto. La kliŝo estas afable pruntedonita al ni de la *Fremdul-Oficejo* en Budapest; pluajn vidaĵojn el la admirinda ĉefurbo de Hungarujo ni publikigos en la proksima numero.

Ni atentigas pri la propono de la Budapestaj samideanoj, aranĝi en 1921 *postkongreson en Budapest*, se la Dektria Universala Kongreso okazos en Praha. Tiu propono estas nepre subteninda, ĉar Budapest estas konata kiel unu el la plej belaj urboj de l' mondo; ĝi estas vera „Hungara Paris". Cetere, pro la malalta kurzo de la Hungara Krono, ĝi estas malkosta urbo por eksterlandanoj.

Bedaŭrinde ni ricevis nur la kliŝojn pri Budapest, sed ne ankoraŭ la klarigontan tekston anoncitan; eble ĝi pereis survoje.

Al la tutmondaj samideanoj ni rekomendas, agi samamaniere instigante la fremdul-oficejojn, ke ili sendu al ni kliŝojn kaj Esperanto-artikolon pri sia urbo. Per tio profitos via urbo kaj nia ĵurnalo kaj la Esperanto-movado. Via urbo: ĉar ĝi fariĝos konata tra la mondo. Nia ĵurnalo: ĉar ĝi riceros senpage interesajn ilustraĵojn. La Esperanto-movado: ĉar la fremdul-oficejoj kaj la publiko atentiĝos kaj ekinteresiĝos pri Esperanto.

Ĉiukaze, jen estas bonega maniero *praktike* utiligi Esperanton. Budapest faris la komencon; daŭrigu vi!

Iom post iom.

Ni havis belan iluzion: per unu ekkurego ni volis atingi la celon. Ni lernis modestiĝi. Nur **iom post iom**, paŝon post paŝo antaŭeniĝante, ni povos gajni la kampon. Nia fincelo, certe, estas la **ĉiutaga** ĵurnalo Esperantista. Sed ekzistas **etapoj** sur la vojo al tiu ĉi celo: komence la duonmonata gazeto, poste la semajna, pli poste la duonsemajna kaj fine — la ĉiutaga. La unuan etapon ni tuj ekokupis: la duonmonata gazeto. La atingo de ĉiu plua etapo estos nova venko por ET kaj por la Esperanto-afero entute.

Kiel ni jam skribis en nia unua numero — ET ja valoras nenion, se ĝi ne eliros almenaŭ ĉiusemajne. Tri-, du- aŭ ĉiumonatajn gazetojn Esperantujo havas pli ol sufiĉe. Plia gazeto tia estus laŭ nia konvinko ne sole ne necesa, sed eĉ malutila, ĉar mankus al ĝi nuntempe la vivebleco. Do ni pli volus tute rezigni je la eldonado de ET ol daŭre ĝin eldoni nur monate aŭ duonmonate.

Se la abonoj daŭros alveni kiel en Julio, dukvar potage, ni estos plene kontentaj kaj atingos la duan etapon, la ĉiusemajnan ĵurnalon, jam en Oktobro.

Ĝojige estas por ni konstati, ke ankaŭ el eksterlando la abonoj komencis alveni. Ŝajnas do, ke la malfido parte jam malaperis, kaj ni rajtas supozi, ke ĝi tute malaperos, kiam ET efektive eliros regule.

Pri la nova formo de ET (certe malpli bona ol la specimena numero) la legantoj estas tre indulgemaj; ili konsentas, ke eĉ en sia nuna formo — se oni konsideras la malfavorajn cirkonstancojn — la ĵurnalo estas bona kaj subteninda, kaj ili petas, ke ni nepre persistu en nia entrepreno, ĉar nia fina triumfo estas certa.

Dankon, niaj karaj amikoj, pro viaj kuraĝigaj vortoj! Dankon, niaj ŝataj abonantoj, pro via valora subteno! Dankon, niaj fervoraj kunlaborantoj, pro viaj bonaj artikoloj*) kaj raportoj**), pro via helpemo, pro la varbado de abonantoj kaj subtenantoj! Dankon al ĉiu, kiu iel akcelis kaj akcelos nian entreprenon!

Ĝuste nuntempe, ĝuste en la komenco de nia entrepreno, via kuraĝigo, via helpo, via kunlaboro estas duoble valoraj, duoble dankindaj. Se la eldonanto de ET estus kapitalisto, li rekompencus vin per oro kaj donacoj. Li estas nur simpla presisto, sed kun koro brulanta pro entuziasmo por nia afero kaj kun decidema volo persisti ĝis triumfo. Li deziras nenion pli ol utiligi ĉe la ĝusta loko siajn malgrandajn kaj tamen valorajn povojn por nia movado.

Do, ankoraŭfoje, dankon al ĉiuj helpintoj, kaj bonvenon al ĉiuj, kiuj estonte alportos al ni sian helpon en la firma konvinko, ke ET ne estas mortema naskitaĵo kiel cent aliaj, sed ke ĝi iom post iom kreskos kaj evoluos, ĝis la fina celo estos atingita.

*) Kelkaj pli grandaj sciencaj verkoj estas pretaj por esti publikigataj, inter ili: „Prepozicioj post verboj ktp.", grava lingva verko de Rektoro P. Trarbach, travidita de Rektoro Boirac, Prof. Christaller, S-roj Ellersiek, Grabowski kaj Wackrill.

Ankaŭ por la literatura fako ni jam posedas diversajn presindajn manuskriptojn, inter aliaj: „Imperiestro kaj Galileano, 10-a akto, de Ibsen", tradukita de S-ano Bulthuis, LK. — „Michel-Angelo, de Grafo de Gobineau", tradukita de Charlotte Pulvers, LK.

**) Ni decidis, jam nun enpresi tiujn raportojn, kiuj estas sendataj al ni de niaj legantoj, ĉar multaj esprimis tiurilatan deziron. Tamen plenan kronikon pri la E-movado en ĉiuj landoj ni aperigos nur de la tempo, kiam ET eliros semajne.

Unua Propono por konstituciigi Ligon de Nacioj.

Historie kaj ankaŭ aktuale estas interesa fakto, ke la unua serioza propono por konstituciigi ligon de nacioj aperis sur teritorio Bohema (Ĉeĥoslovaka). Bohema reĝo Jiří z Podebrad (Georgo de Podebrady) proponis jam en jaro 1463 Ligon de Eŭropaj Regnestroj, kies ĉefaj principoj frapante similas al ĉefaj decidoj de la nuna Ligo de Nacioj.

Historio rakontas:

Estis malpermesite al la membroj de la ligo, propravole komenci militon; pri milito kaj paco rajtis decidi nur la ligo. Disputojn inter la membroj forigu organoj de la ligo; batalo inter la membroj estu malebligata. Ankaŭ malharmoniojn inter la membroj kaj aliaj ŝtatoj kaj eĉ malkonsentojn inter fremdaj, nemembraj ŝtatoj penas la ligo ordigi. Se la penado ne sukcesos, la ligo helpu tiujn membrojn aŭ partion, kiuj subiĝis je ĝia decido. Ĉiuj membroj gardu severe komunan pacon.

Kiel ĉeforgano de la ligo estis proponita Kolegio de Rajtigitaj Delegitoj de ĉiuj regnestroj; ĉiu nacio reprezentiĝu tie per unu voĉo; antaŭ la voĉdonado de la kolegio estis necesa antaŭa voĉdonado en „naciaj kurioj". Kiel prezidanto (præsidense pater) estis elektota la Franca reĝo.

La ligo estis havonta siajn blazonon, sigelon, kason kaj arĥivon; oficistoj estis elektotaj en la portempa restadejo de la ligo. Kiel unua restadejo estis konsiderota Basel.

La Kolegio de la Rajtigitaj Delegitoj, estante la plej alta institucio de la ligo, decidu pri ĉiuj gravaj aferoj; ĝi decidu pri paco kaj milito, ĝi fiksu nombron de militistaroj kaj unuspecan elpagon de soldataj salajroj, ĝi zorgu pri sia alprovizigo kaj disponigu konkeritajn teritoriojn. Ĝi starigu Ligan Tribunalon havantan senliman leĝdon-povon; la leĝoj estu formataj „sur bazo de la natura rajto".

La Liga Tribunalo, konsistante el juĝistoj kaj asesoroj, kunsidu en la sidejo de la kolegio. Ĝi estu antaŭ ĉio tribunalo por regnestroj kaj ĝi posedu ankaŭ leĝdon-povon laŭ modelo de la tiama Bohema Landa Tribunalo.

Kotizaĵoj por kovri ligajn elspezojn estis de la kolegio fiksotaj en sumo de tritagaj enspezoj de regnestro kaj regnano, ankaŭ parto de ekleziaj depagoj apartenis al la liga kaso; la kotizaĵoj estis devigaj.

— La ĉefa malhelpaĵo de la plano fariĝis la faktoj, ke al la imperiestro, kiel Germana Reĝo, estis donitaj nur la samaj rajtoj kiel al la ceteraj membroj de la ligo (la reĝo Franca estis preferata), kaj ke la Papo ne devis aniĝi; al li estis donita ofico de peranto inter nemembroj de la ligo, kaj plie li estis helponta la laŭordan enkasigon de la ligaj kotizaĵoj per minacoj de ekleziaj punoj.

La brilo de imperiestreco tiam pli kaj pli estingiĝis; kontraŭe la malatento pri la Papaj mondpotenco kaj diplomatio kaŭzis malsukceson de la plano de Georgo de Podebrady.

Akirinte konsenton pri sia projekto en Polujo kaj Hungarujo, Georgo komencis trakti en la okcidentaj regnoj, antaŭ ĉio en Burgundlando kaj en Venecio. Al Ludoviko XI. li sendis specialan delegitaron; la ĵurinta kontraŭulo de la Papo nature bone komprenis la profiton garantiotan al li de simila federacio, kaj li estis ema subteni la planon de Georgo. Sed nun la Papa diplomatio streĉis ĉiujn siajn fortojn, kaj la pastraro sciis ĉiujn — post longa intertraktado — okazintajn kunsidojn malebligi. La plano de Georgo de Podebrady estis tiel malaperigita por longa tempo, por nur nuntempe, post la monda milito, fariĝi aktuala, por ke ĝi nun en moderna, pli vasta formo fine por la bono de l' homaro efektiviĝu!

El „Ĉeĥoslovaka Korespondo" tradukis
O. SKLENČKA, Del. UEA.

Bonvolu atenti!

Ni konscias, ke nia ĵurnalo en sia nuna formo estas ankoraŭ tre nekompleta kaj neperfekta. Nur, kiam ĝi eliros regule ĉiusemajne (eble depost Oktobro, sed plej malfrue depost Novembro) kaj estos atinginta konsiderindan nombron de abonantoj, ĝi ja povas fariĝi tia, kia ni ĝin aspiras kaj kia la abonantoj ĝin deziras.

Pro manko de loko la hodiaŭa n-ro ne enhavas la rubrikojn Scienco kaj Tekniko, Parolejo, Enigmoj k. a., sed en la sekvonta duobla numero elironta fine de Aŭgusto kun la Kongresa raporto ni disponigos unu tutan folion (4 paĝojn) ekskluzive por Scienco kaj Tekniko, Arto, Literaturo k. s.

Mankas al ni ankoraŭ kompetentaj kunlaboranto en fakoj: Tutmonda Kroniko (ĉiusemajne 3—8-liniaj novaĵoj kaj unu resum-artikolo), Sporto, Ŝako, Internacia Esperanto-Servo (monata aŭ kvaronjara letero el la unuopaj landoj) k. a. Ĉiuj emantaj kunlabori en iu fako, bonvolu informi nin.

Nia nova Akademio.

En Majo lasta okazis elektoj de novaj Akademianoj. Estas elektitaj S-roj Corret, Grosjean-Maupin, Kuhnl, Privat kaj Warden. Estas reelektitaj S-roj Cart, Mybs kaj de Lengyel. La Akademio konsistas nun el sekvantaj 15 personoj:

Th. Cart, P. Christaller, P. Corret, Evstifejeff, A. Grabowski, E. Grosjean-Maupin, V. Inglada, E. Kuhnl, P. de Lengyel, D-ro Mybs, P. Nylén, E. Privat, R. de Saussure (?), A. E. Wackrill kaj J. M. Warden.

Du Konsiloj de l' Akademio al la Esperantistoj.

Ĉar Esperanto estas vivanta lingvo, la Akademio havas nek la rajton nek la devon trudi aŭ malpermesi ion ajn, sed la rajton ĝi havas kaj la devon doni konsilojn.

1. La Akademio konsilas, krom en kazo de absoluta neceso, uzi nur tiujn radikojn, prefiksojn kaj sufiksojn, kiuj troviĝas en la Universala Vortaro kaj en ĝiaj Oficialaj Aldonoj. **(Vidu Oficiala Gazeto!)**

Ĝi cetere nun preparas trian aldonon al la Komuna Vortaro kaj organizos prilaboradon de tehnikaj vortaroj kun helpo kaj kunlaborado de spertaj Esperantistoj kompetentaj en ĉiu tehnika fako.

2. Aparte **pri landnomoj,** ĝi **insiste** kaj **forte** konsilas, precipe al la Gazetoj, sed ankaŭ ĝenerale al ĉiuj Esperantistoj, kiuj konscias ke disciplino estas absolute necesa por konservi la unuecon de nia lingvo, uzi nur la Fundamentan kaj tradician finiĝon **ujo:** Turkujo, Rusujo, Germanujo ktp.

La Akademio memorigas ke jam en la jaro 1909 ĝi **oficiale** voĉdonis **kontraŭ** la sufikso **i** por landnomoj. La rezultaton de tiu voĉdono ĝi publikigis en **Oficiala Gazeto,** 25. Aprilo 1910, p. 326.

Akcepto de la sufikso i por landnomoj ne sole estus grava ŝanĝo en nia Fundamento, sed ankaŭ signifus plenan disfalon de la tuta Esperanta sistemo, en kiu la vorto **Turkio,** ekzemple, nur povas havi la sencon **Turk-io,** nome, io turka aŭ **turkaĵo,** tute same kiel **bon-faro** signifas **faro bona.** La vorto **io** jam ekzistas en Esperanto, kiel memstara vorto, kun la senco **quelque chose, etwas, anything,** kaj ĉar, laŭ klarigoj de D-ro Zamenhof mem (Fundamenta Krestomatio, p. 249; Lingvaj Respondoj [dua serio], p. 30; Oficiala Gazeto, 25. Aprilo 1910, p. 324), ankaŭ prefiksoj, sufiksoj kaj gramatikaj finiĝoj efektive estas en nia lingvo nur memstaraj vortoj, tute similaj al la ceteraj, tial al la vorto **io** ni ne povas nun doni la sencon **lando.**

* * *

NB. Laŭ apliko de la artikolo VII. 2 de la regularo, la Akademio decidis, ke S-ro de Saussure ne plu estas membro de la Akademio nek de la Lingva Komitato.

Esperanta Kroniko.

(Hodiaŭ ni komencas publikigi tiujn raportojn, kiuj jam nun estas sendataj al ni de niaj legantoj. Sed ni atentigas, ke tiu kroniko povas esti nur ekstreme nekompleta, kaj ke nur depost la ĉiusemajna aperado de ET ĝi fariĝos kompleta kaj vere utila.)

BRITUJO.

ESPERANTO EN LERNEJOJ. La Edukada Aŭtoritato de FIFESHIRE decidis enkonduki E en Burntisland Algrada Tag-lernejo kaj ankaŭ en kelkaj vesperaj lernejoj sub sia aŭspico.

La 15-a jara KONGRESO de SKOTA ESPERANTISTA FEDERACIO okazis kun granda sukceso en la Universitato Edinburgh la 19 Junio. 225 E-istoj ĉeestis.

BULGARUJO.

PLEVEN. Tie ĉi fondiĝis grupo „Esperanto" kun pli ol 75 membroj, je iniciato de S-ro Simo P. Simov, telegrafisto, kiu estas elektita kiel ĝia prezidanto. E faras grandan antaŭenpaŝon, multaj ekinteresiĝis. Bonegajn fruktojn promesas la aŭtuno.

ĈEĤOSLOVAKUJO.

SAAZ. La Saaza urba konsilantaro decidis en sia lasta kunsido, laŭ la propono de Prof. J. Süsser, fondi en Septembro nunjara URBAN E-LERNEJON en Saaz, ĉar la urbo havas pro sia mondkomerco kun lupolo grandan intereson je la unuigo de la lingvoj. Pri la direktado de la fondota lernejo estos komisiata Prof. Süsser, kiu ankaŭ laŭ demando donas detalajn informojn.

18-a UNIVERSALA KONGRESO de LIBERA PENSO okazos la 5—9 Septembro en PRAHA. Preparaj laboroj estas jam delonge entreprenataj, kaj oni kredas, ke la kongreso fariĝos grava kaj sukcesplena manifestacio de progresemuloj ĉiulandaj. Esperantistoj-liberpensuloj! Kiu interesiĝas pri la kongreso, petu Esperantan programon, eĉ se vi ne partoprenos. Ĉeĥoslovakaj samideanoj sukcesis konvinki la kongresan oficejon pri la utileco de nia lingvo — per ĝia praktika uzo pruvu tion Vi! — Adreso: Oficejo de la 18-a Universala Kongreso de Libera Penso, Praha, Palác Lucerna. — Kiu intencas partopreni, anoncu sian alvenon al O. Sklenĉka, Del. UEA, Hradec Králové, kiu estas al ĉiu kongresonto je plena dispono.

GERMANUJO.

BRESLAU. La administracio de la ĉi-tiea popola altlernejo konsentis, venontan vintro-semestron enkonduki Esperanton en sia plano.

REVELO (Rejnlanda-Vestfalia E-Ligo) Köln, Hohestr. 26. Laŭ propono de la Revela Komitato okazis en la lasta tempo pluraj amikaj kunvenoj de Revelanoj el diversaj lokoj por interkonatiĝi kaj priparoli la plej necesajn aferojn. Tiuj kunvenoj komenciĝis la 27 Junio per vizito de s-anoj el Godesberg, Horrem kaj Weiden en Köln. — La 4 Julio oni vizitis la Godesbergan grupon „Godea".

La kunveno en Düsseldorf, kiu okazis la 18 Julio, kunigis s-anojn el Bottrop, Düsseldorf, Elberfeld, Essen, Horrem, Köln, Menzelen, Weiden kaj Wipperfürth. El Koblenz (kie jus refondiĝis grupo), Godesberg kaj Buer venis senkulpiĝoj pro gravaj malhelpoj veni. Je la 4-a ptm. ĉeestis 50 ges-anoj, kaj el ne-oficiala kunveno fariĝis vera laborkunsido, kiu daŭris ĝis la 7-a.

El la raportoj estis la plej interesa tiu de Essen, kie oni laboris plej efike kaj celkonscie. Ĉeestis ankaŭ s-anoj el laborista grupo, kies trafaj paroloj montris, ke multaj burĝaj grupoj povas lerni de la laboristaj s-anoj pri celemo kaj persista, obstina laboro.

La debato estis viglega kaj kuraĝigis la ĉeestantojn al pli fervora penado. Oni estis unu-opinia pri la neceseco, instigi ĉiujn Revelajn grupojn kaj izolulojn aniĝi ĉe GEA. Fine oni decidis kunvoki Revelan kunsidon la 19 Septembro en Düsseldorf, kie oni pritraktos ĉefe jenan tagordon:

1. Elekto de l' estraro.
1. Kotizoj.
3. Aniĝo de l' grupoj ktp. ĉe GEA.
4. Labormetodoj de la diversaj grupoj.

Oni postulis, ke ĉiuj ĝis nun apatiaj grupoj kaj izoluloj en Rejnlando kaj Vestfalio energie eklaboru kaj kunpenadu kun Revelo; ke ili almenaŭ respondu al la cirkuleroj de la komitato. Esperanto povos nur tiam efike disvastiĝi, kiam ĉiuj helpos per tuta sia forto. La grupoj promesis helpi laŭpove al najbaraj grupoj kaj izoluloj ĉe ilia propagando. Por efektivigi tion, estas nepre necese, ke la ĝis nun tiel silentemaj modestuloj tuj sin turnu al la Revela Sekretarieĵo, Köln, Hohestr. 26.

Ni petas la grupojn kaj izolulojn, sendi la proponojn por la tagordo de la Revelo-Tago ĝis la 15 Aŭgusto al Teo Jung, Horrem Bez. Köln, por ke ni povu presigi kaj dissendi ilin al la Revelanoj tiel frue, ke ili povos esti priparolataj en la grupaj kunvenoj antaŭ la Revelo-Tago.

LITOVUJO.

KOVNO. Granda brulego pereigis la 17 Junio pli ol 200 domojn, interalie la ejon de Kovna E-Societo kun tuta havaĵo, biblioteko (250 libroj), vendejo ktp. Ni kalkulas niajn perdojn ĝis 4000 Mk.

UKMERGÉ (distrikta urbo). S-anoj J. Mačernis kaj M. Morkunas faris propagandan paroladon speciale por instruistoj Litovaj, kunvenintaj el du distriktoj por someraj kursoj perfektigaj. — Post la parolado malfermiĝis kurso kun 40 partoprenantoj.

AMERIKO.

BALTIMORE, Md. Juna sed talenta Pola verkisto, S-ro Adamo Bartosz, komencis redakti daŭran Esperantan Fakon en Pola monatĵurnalo „Postęp" (Progreso).

ERIE, Pa. En Katolika Kolegio de S-ta Johano Kanto la Pola Studenta E-ista Societo kun helpo de la profesoro E. Bobrowski komencis eldoni „La Studento" en Esperanta kaj Angla lingvoj.

NEW YORK. La 22—25 Julio okazas tie ĉi Kongreso de E-istoj de Usono kaj Kanado. El la insulo Kubo kaj Meksiklando espereble ankaŭ partoprenas kelkaj delegitoj.

PHILADELPHIA. Pola E-ista Societo „Esperanta Stelo de Polujo en Ameriko" ĵus eldonis propagando-broŝureton en Pola lingvo el la plumo de Eŭgeno Bobrowski, prof. de matematiko. La broŝureto portas la titolon „Esperanto kiel lingvo internacia".

GAZETARO. En lastaj n-roj de „Darbininkas" (Laboristo) en Litova lingvo kaj de „Amerikanskije Izvestija" (Usonaj Sciigoj) en Rusa lingvo estis favoraj mencioj pri E kaj nia movado.

AŬSTRALIO.

Ĵus ni ricevis interesan ne-oficialan raporton pri la Tria Aŭstralia Esperanto-Kongreso, kiun pro ĝia longegeco ni devas prokrasti ĝis la proksima n-ro.

Esperanto ĉe la Poŝto.

En Francujo S-ro la poŝtinspektoro MICHELIS DI RIENZI, 20 Avenue Reille, Paris XIV, restarigis l'„Association Espérantiste du Personnel des Postes, des Télégraphes et des Téléphones de France et des Colonies". La Franca poŝtministro, S-ro Deschamps, akceptis la titolon de honora membro kaj promesis subteni la deziron de la asocio en la venonta Universala Poŝta Kongreso de Madrid. La deziroj estas: oni allasu Esperanton kiel mondhelplingvon al la lingvoj, en kiuj la estonta Poŝta Konvencio estos redaktata, kaj oni enkonduku Esperanton en ĉiujn dokumentojn kaj oficajn formularojn destinatajn por cirkulado inter la landoj kontraktantaj. Sendube la gvidado de la Franca asocio estas en tre lertaj manoj, ĉar la Pariza gazeto „La France Postale" de la 10-a de Julio skribas pri Sinjoro di Rienzi: „Oni scias, ke tiu ĉi oficisto estas samtempe sciencisto kaj fama verkisto, al kiu ni ŝuldas krom certa nombro de filozofaj kaj sciencaj verkoj precipe du valorajn literaturajn repertuarojn: ‚Profils contemporains' (Profiloj samtempulaj), kiun Anatole France prologis en la jaro 1895 kaj la Akademiano Henry Houssaye en la jaro 1898, ‚Croquis Corses' (Skizoj Korsikaj) ktp."

Tre ĝojige estas, ke nun nia Franca samideano kune kun la supera poŝta konsilisto OTTO REBER en Bamberg (Germ.) ekstarigas la **Internacian Ligon de Esperantistaj Poŝtoficistoj** (ILEPO). Ĉiuj geposhistoj, getelegrafistoj kaj getelefonistoj helpu kaj tuj anoncu siajn adresojn al S-ro Oberpostrat Reber, Friedrichstrasse 6, en Bamberg (Germ.). Ankaŭ unuiĝoj, grupoj kaj izolaj E-istoj, kiuj konas la adresojn de E-aj geposhistoj, varbu ilin por ILEPO aŭ almenaŭ sciigu S-ron Reber pri la adresoj. Laŭ la opinio de UEA ni nepre bezonas fakan (teknikan) poŝtan vortaron.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Ŝidlóvskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

(1-a daŭrigo.)

Kompreneble, ĉiuj bone konjektis, ke la paperfolieto kostas ne malgrandan monon. El tio oni prave konkludis, ke Osip Lozinski ne vane ekiris en la mondon, ke en la mondo do estas eble trovi sian sorton.

Kaj ĉiu pensis pri si mem: estus bone, ke mi same . . . . Eĉ la skribisto, ankaŭ Loziŝĉano, ne tuj fordonis la leteron al S-ino Lozinska, sed tutan semajnon konservis la leteron kaj meditadis: — Ŝi estas malsaĝa virino, sed kun ĉi tiu paperfolieto povus ankaŭ pli saĝa homo veturi Amerikon kaj serĉi tie por si feliĉon . . . . Sed sur la bileto staris tute klare, kvankam ne en nia lingvo, skribita: „Mrs. Katharina Joseph Lozinsky", — „Joseph Lozinsky", certe, ne malhelpus, sed „Katharina" estis sendube virina nomo kaj „Mrs." kredeble, ankaŭ signifas „virino". Unuvorte, kvankam la skribisto ĝis la lasta momento restis malbonhumora, tamen li eltabligis la bileton, aparte konservatan, kaj ne volonte donis ĝin al la virino. Ŝi prenis la bileton, sidiĝis sur benkon kaj maldolĉe ekploris.

Kompreneble, ŝi ĝojis pro la letero, sed ĉu ĝojo ne plorigas? Krom tio, ŝi devis nun forlasi la hejman vilaĝon, la geparencojn, genajbarojn. Oni devas aldoni, ke S-ino Lozinska estis virino juna kaj sana. Dum foresto de l' edzo, ne mankis malfeliĉo, — tiu sama skribisto ankaŭ ne malmulte tedis ŝin per sia amindumado, — kaj al sia konfesprenanto ŝi ankaŭ ne povis ne konfesi, ke „la diablo" ne lasadis ŝin en paco. Pli ol unu fojon iu kvazaŭ murmuretis en ŝian orelon, ke Osip troviĝas malproksime, ke neniu ankoraŭ estis reveninta al Loziŝĉi el tiom malproksimaj landoj, ke eble korvoj de longe jam forportis eĉ la ostojn de ŝia edzo, dum ŝi ĉi tie vane pasigas siajn junecajn jarojn, estante nek virgulino, nek vidvino, nek edzino. Certe, ŝi estis virino prudenta kaj ne facile delogebla, tamen, kiam ŝi ricevis nun tiun leteron, ekposedis ŝin tuj vera ĝojo kaj vera malĝojo kaj ĉiuj pekaj pensoj de juna senedza virino, kaj kvazaŭ denove revenis la sendormaj noktoj kun flamaj revoj. Unuvorte, la virino svenis, kaj ŝia frato, Mateo Lozinski, nomata Timono, devis en siaj brakoj porti ŝin en ŝian domon.

Jen oni komencis pridiskuti la aferon en la vilaĝo! Osip Lozinski riĉiĝis en Ameriko, fariĝis tia grava persono, ke oni eĉ demandas lian konsilon, elektante la prezidanton de la regno . . . Multajn horojn la junularo pasigis en la tiea drinkejo, — oni trinkis bieron kaj mieltrinkaĵon, oni fumis pipojn, oni disputis, oni fanfaronis, oni bruadis ĝis post noktomezo.

Aŭskultante ilian interparoladon, oni povus supozi, ke ĝis la antaŭkristnaska fasto ne restos eĉ unu sola juna viro en Loziŝĉi. Se eĉ Osip tie estis demandita, kiun li deziras elekti prezidanto, kion do tie povos fari aliaj pli spertaj ol Osip? Ĉar tie ja regas libereco!

Libereco! Jen la vorto, kie nun ofte estas ripetata en la drinkejo de la Hebreo Ŝlemo, kiu kviete ĉion aŭskultas el post sia ŝranktablo. Verdire, ne ĉiu Loziŝĉano bone komprenis, kion la vorto signifas. Sed ĝi estis parolata iel belsone kaj enhavis ion, pro kio homo fariĝas ŝajne pli altkreska kaj rememoras ion neklaran, sed agrablan . . . . Ion tian, pri kio laŭfame en la vilaĝo sciis la iamaj homoj, pri kio ankaŭ iliaj nunaj posteuloj ŝajnigas ion scii . . . .

Sed multon ja oni povas paroli, parolo ne estas faro. Oni paroladis, oni bruadis, fine oni ĉesis. Tamen estis du viroj, kiuj ne ŝatis multe paroli antaŭ ol plenumi la agon. Ili duope pripensis, pritraktis la aferon, kaj jen — ili vendas siajn dometojn kaj la terpecojn. Ne multon vendeblan ili posedis, certe, kaj kiam ĉio estis vendita, tiam ili anoncis: Ni ankaŭ forveturas kun Katerina Lozinska, por ke ne pereu ŝi dum la vojaĝo.

Unu el tiuj viroj estis ŝia frato, Mateo Timono, viro de grandega kresko, larĝŝultra, kun rastilsimilaj brakoj, kun blondaj krispaj haroj sur granda kapo — vera arbara urso, sed kun okulojn kaj koro de infano. Li ankoraŭ estis fraŭlo, havis malnovan, malgrandan dometon kaj tiel malgrandan terpecon, ke se li kuŝiĝus laŭlarĝe de ĝi, liaj piedoj tuŝus jam fremdan posedaĵon. Li ne ŝatis multe paroli nek ridi. Li posedis la malnovan biblion de sia avo, kun plezuro ĝin legis kaj ofte li pri io meditis tute sola, honteme kaj malgaje. Neniam oni lin opiniis homo saĝa, kaj la junularo de Loziŝĉi ne malofte lin primokis eble pro tio, ke li, spite sian eksterordinaran forton, ne volonte uzadis siajn pugnojn.

Li havis plej intiman amikon, Ivanon Dima. Dima estis viro de tute alia speco: malaltkreska, malforta, sed gaja, babilema, sprita. Dima estis malgrasa, moviĝema, li havis hirtajn harojn, brilantajn okulojn, rapidan, lertan langon, longajn lipharojn, kiuj laŭ kozaka modo ĉiam pendis malŝupren. Neniu lin opiniis malsaĝulo, kaj en disputoj li ne estas homo cedema. Sed incitinte iun per siaj pikemaj ŝercoj, li penadis resti en la proksimeco de Mateo, ĉar forton ne havis liaj pugnoj, kaj neniam li povus esti venkanto en interbatiĝo.

Kiam oni eksciis en Loziŝĉi pri la intenco de tiuj du viroj forvojaĝi Amerikon, ĉiuj sentis sin malkontentaj.

„Ĉu bone vi faras, Mateo", parolis liaj kunuloj, „entreprenante tian longan vojaĝon? Vi ne estas saĝa homo, kaj Ivano ne estas forta. En Ameriko anseroj vin piedpremos!" (Daŭrigota.)

Letero de l' Germana Instru-Ministro favora al Esperanto.

La Ministro por Scienco, Arto kaj Popola Instruado. Berlin W 8, la 8 Julio 1920.

N-ro 1155 U II. 1.

Al la petskribo de la 51-a de Majo de tiu ĉi jaro.

Al la aspiroj, enkonduki Esperanton kiel universalan helplingvon, MI NEPRE ESTAS FAVORA. Sed mi opinias, ke ankoraŭ ne alvenis la tempo enkonduki Esperanton en la lernejojn per ordonoj de mi farotaj. Tamen kie ajn estos eble enkonduki Esperanton en la lernejojn, mi afable ekzamenos eventualajn proponojn kaj volonte helpos forigi malfacilaĵojn. Estos plej bone, ke antaŭ ĉio la Esperantaj societoj klarigu la gravecon de siaj klopodoj al la publiko kaj fiamaniere mem akcelu sian aferon.

HAENISCH.

Al Sinjoro la Poŝtdirektoro RIECK en Greifswald.

Eklezio.

DEK JAROJ IKUE. (Fino.)

Jen komenciĝis la milito!

Kaj la Nesatigebla enterigis per sia infera furiozado ĉion: la intencitan kvinan kongreson dum Aŭgusto 1914 en Lourdes, la „Espero Katolika“ kaj per tio la IKUE. Ĝi restis dummilite sen estro (la lasta prezidanto estis kaj estas nun ree pastro Parker en Irlando) kaj sen organo. Pli ol cent numeroj „Espero Katolika“, laste bonege redaktita de S-roj D-ro Smulders kaj pastro Poell (ambaŭ en Nederlando), estis atingitaj.

Ofero de l' milito ankaŭ fariĝis la naciaj katolikaj Esperanto-organoj, esceptinte la „NEDERLANDA KATOLIKO“, kiu ankaŭ dum la milito estis plue eldonata regule de la bravaj Nederlandanoj; krom tio nur malregule aperis la Aŭstruja „KATOLIKA STELO“ kaj depost aŭtuno 1918 „BLANKA KRUCO“, kiu estas depost Januaro 1920 la oficiala organo de la „Germana Ligo de Katolikaj Esperantistoj“ kaj de la „Aŭstruja Katolika Ligo Esperantista“.

Sed neniu nacia organo povas anstataŭi la internacian, kaj pro tio nun alta nobla ĝojo regas inter la katolika Esperantistaro, ĉar post 5-jara interrompo fine „ESPERO KATOLIKA“ denove estas eldonata, sed nun en Aŭstrujo de parohestra moŝto patro Koller, O. S. B. en Göttweig (Malsupra Aŭstrujo) en la eldono de S-ro Schroeder, redaktoro de la „Wiener Neuigkeits-Weltblatt“, Wien VII, Kaiserstr. 10. La titolan paĝon nun ornamas ne nur la rimarko: „Honorita per Apostola Beno de PIO X-a, la 27-an de Junio 1906“, sed ankaŭ la nova: „Protektata de la Kardinala Moŝto D-ro Frid. Gust. Piffl, Ĉef-episkopo en Wien“. La jar-abono kostas 5 Sm laŭ nacia monvaloro. La organo aperas monate ilustrite.

La Aprila n-ro de „Espero Katoliko“ publikigis la bildon kaj biografion de sia alta protektanto. Lia Kardinala Moŝto tre favoras la katolikan E-movadon, depost kiam li informiĝis pri ĝi en longa aŭdienco kun la konata E-isto P. Decoene, C. Sc. R., kiu rakontis pri sia misia agado en Kanado per Esperanto. Fine li subskribis jenan frazon: „Esperanto certe estas taŭga helpi la defendon de la katolika kredo. — Wien, 21. 4. 20. † Fr. G. Piffl, Erzbischof von Wien.“

Jam antaŭ la milito altrangaj protektantoj apartenis al IKUE, i. a. la fame konata prefekto de la propagando ĉe la Vatikano, Kardinala Moŝto van Rossum, kiu iam profete eldiris, ke Esperanto plenumos al la Eklezio ankoraŭ grandajn servojn. Plej rimarkinde ankaŭ estas la fakto, ke la mondkonata „Organizo por Tutmonda Paco, Blanka Kruco“ en Graz (Stirio) uzas Esperanton kiel memkompreneblan necesegan ilon por atingi siajn celojn, unuvorte kiel la veran „katolikan lingvon“.

Vere la dekjara antaŭmilita brila historio de la IKUE „evidente pruvas, ke Esperanto estas nenio alia ol admirinda ilo neŭtrala, apartenanta al ĉiu, kapabla utiligi ĝin, do fakte utila ankaŭ al la katolikoj, kiel al ĉiuj ceteraj homoj“*). Precipe al „ne-katolikoj ĝi montras, ke nia katolika kredo ne malhelpas nian amon al progreso, male, ke ĝi estas fonto, el kiu ni ĉerpas grandan forton, por labori je la bono de la homaro kaj helpi al ĉio, kio povas pliproksimigi la efektivigon de la idealo de amo alportita de Kristo al la mondo“*).

Kaj kiujn celojn klopodadas atingi nia IKUE! Ho, la plej noblajn:

1. rekonduki la homojn, precipe la katolikojn, de el la nacia ŝovinismo al la sento de vera homaranismo kaj frateco, al kristana solidareco;

2. konservi per la uzo de Esperanto la katolikajn mondkongresojn, precipe la Eŭkaristiajn kaj Marianajn, kontraŭ malŝparo de tempo kaj forto, igante ke ili fariĝu la plej brilaj de la tero;

3. starigi per la Apostolato de Katolika Mondgazetara Oficejo kontraŭ nekredo granitan muron, antaŭ kiu disfrakasiĝas ĉiuj kontraŭkristanaj atakoj;

4. utiligi per Esperantigo bonajn naciajn katolikajn verkojn por la „mondkatolikismo“;

5. faciligi la buŝajn kaj skribajn ideo-interrilatojn inter la multaj katolikaj unuiĝoj kaj organizoj jam flegantaj internaciajn interrilatojn;

6. ebligi al la gemembroj de IKUE utilajn kaj agrablajn interrilatojn ĉiuspecajn kun samkredanoj eksterlandaj kaj por certigi al ili, vojaĝonte eksterlanden, loĝejojn sendubajn, komunikaĵojn decajn faciligante iliajn komercajn interrilatojn ktp.

Per tio IKUE ankaŭ respondas la tiel ofte aŭditan demandon: „Kial ni do bezonas KATOLIKAN Esperanto-movadon?“

*) P-ro Fr. Mestan en E. K. n-ro 5 (Marto 1920).

Jen, estas verege, kion la unua prezidanto de IKUE, nia neforgesebla milda P-ro Austin Richardson skribis iam en E. K. n-ro 90:

„Esperanto estas utilega kaj eĉ nepre necesa por la internacieco de ĉiu katolika societo. Pli kaj pli katolikoj de la tuta mondo devus plimultigi reciprokajn interrilatojn. Rajte kaj ideale la katolikaro estas unu granda familio, sed pro la lingva barilo ĝi estas el la vidpunkto de mondofamilio „familio de muituloj“ sen komuna familia lingvo. En la momento, kiam la katolikaro posedos unu komunan lingvon, kiam ĉiu katoliko povos per Esperanto interrilati parole kaj skribe kun ĉiu alia katoliko, ni estos nevenkeblaj, ni estos la plej granda potenco sur la tero. Ĉiu malamiko de Esperanto estas, volonte aŭ nevolonte, malamiko de la katolika triumfo. Penadu ni, por komprenigi tion al ĉiuj katolikoj, al pastroj kaj al laikoj!“ (Parte laŭ „Espero Katolika“.)

M. MIELERT (Breslaŭ),
Prezidanto de la Germana Ligo de Katolikaj Esperantistoj.

Redakcia Respondejo.

L. G. en P. En via karto vi skribas: „Bedaŭrinde mi konstatis, ke en via ET ekzistas cenzuro kiel dum la milito en niaj naciaj gazetoj — ĉar en nia teksto estas Francio. Kial tio? Ĉar D-ro P. Corret skribis al vi? Sed kiom da Esperantistoj reprezentas S-ro P. C.? ktp.“ Bonvolu permesi — via riproĉo estas senfunda. Legu mian respondon al D-ro P. C. (Parolo 6)! Mi deklaris tie, ke mi estonte presos konsekvence -ujo, sed ke mi presos -io tiukaze, se iu io-ano en iu sia artikolo aŭ anonco postulus la presigon de -io. Nu, vi postulis, ke mi presu „Francio“ en via anonco; do mi faras ĝin en la hodiaŭa numero tute konforme al mia deklaro. Mi ja volas mem, ke toleremo estu unu el la ĉefaj virtoj de ET. T. J.

F. A. G. en P. Ni faris laŭ via propono kaj sendis 50 ekz. de nia gazeto al BEA. Dankon pro via letero kaj viaj stimuloj!

M. M. en M. Dankon pro via abono; sed vi ne precize atentis la abon-kondiĉojn en la spec. n-ro, laŭ kiuj via abono valorus por duona jaro. Laŭ la novaj kondiĉoj via abono valoras por n-roj 1—28.

K. V. en P. Ankaŭ vi ne atentis sufiĉe la abonkondiĉojn, laŭ kiuj via abono valorus por 4 monatoj. Laŭ la novaj kondiĉoj ĝi valoras por n-roj 1—15. Dankon pro la interesaj sciigoj, kiujn ni publikigis en la hodiaŭa n-ro. Ĉe la kunsendita versaĵeto la ritmo ne plaĉas al ni; bonvolu pardoni, ke ni ne uzas ĝin.

S. M. en L. R. Vian abonpagon ni ne ankoraŭ ricevis de la Centra Librejo; ni enskribis vin en la liston de niaj abonantoj.

D-ro H. en E. Bonvolu vin turni pro la dezirata libro al S-ro Ellersiek en Berlin, Wißmannstr. 46, aŭ al Ader & Borel, Dresden, Struvestr. 40. Dankon pro via intereso kaj promesita abono al ET.

R. P. en H. Ni konsentas al vi rabaton de 20 proc., kiun vi dekalkulu ĉe via proksima pago.

Recenzejo.

LIBROJ.

(Estonte ni nur recenzos duoble ricevitajn librojn, el kiuj unu estas por la redakcio, alia por la recenzisto.)

FAKA VORTARETO Nr. 1 (Terminoj uzataj en la fabrikado de ombreloj). Havebla ĉe la Brita Esp. Asocio, London WC 1. — 12½ : 19. 4 paĝoj. Prezo 1 PK.

Kvankam malgranda, la folieto estas la komenco de gravega entrepreno. Ĉiu teknikisto nepre devas posedi ĝin: ĝi enhavas du ilustrajojn de ombrelo, kun apudaj Esperantaj terminoj precize klarigitaj per Angla lingvo. Oni tuj mendu ĝin por fari siajn kritikon kaj konsilojn. R-ANO.

GAZETOJ.

Ni konfirmas la ricevon de jenaj gazet-numeroj:

a) Esperantaj Gazetoj.

JUNECO. Monata Revuo, eldonata de junuloj por ĉiuj junkuroloj. 1-a n-ro, Julio 1920. Eldonata de la tri fratoj Fethke, Ring 11, Oppeln (Germ.). Nur en Esperanto.

Pri la enhavo de tiu nova revuo mi tre ĝojis: ĝi respeguias vere la entuziasmon, la fantaziemon, la gajecon kaj la konfidemon, per kiuj estas plenigitaj la koroj de la junaj eldonantoj. Tiajn literaturaĵojn, kiajn enhavas tia revuo, oni ne devas rigardi je tro severa kritikemo. Tamen, rilate al stilo, oni ne povas riproĉi la redaktorojn; ĝi estas preskaŭ ĉiel bona. Stranga kaj tre fantazia estas la originala (!) romano „Flugantą Mistero“, ĉe kiu kelkfoje pleonasmo je vortoj, precipe je participoj, pezigas la stilon kaj malklarigas la sencon. Gramatikaj kaj preseraroj tute mankas. Mi konsilus, estonte presi la titolojn de la artikoloj per pli dikaj literoj, por ke oni pli bone vidu, kie unu artikolo finiĝas kaj alia komenciĝas.

Entute, oni povas esti tre kontenta pri tiu junulara revuo. Sed, ho ve, la eldonantoj skribas, ke ili bezonas 1000 abonantojn! Ĉu ili ne seniluziiĝos? Laŭ mia opinio la tempo ne jam estas matura por tia speciala porjunulara gazeto. Ĉu ne estus estinte pli prudente, aranĝi specialan rubrikon por gejunulaj aferoj en niaj jam ekzistantaj E-istaj gazetoj?

Mi deziras al miaj junaj s-anoj ĉiun sukceson, ĉar ili efektive meritas ĝin pro sia granda fervoro kaj sia bona scipovo de Esperanto; sed mi konsilas, ke ili ne tro multon esperu, por ke poste ilia seniluziiĝo ne estu tiel granda. R-ANO.

LA STUDENTO. Majo kaj Junio-Julio 1920. Oficiala Organo de la Pola Studenta Societo en Erie, Pa., Usono. Jara abono 1 Dolaro. En lingvoj E kaj Angla.

Apenaŭ mi estis leginta la ĉi-supre recenzitan revuon, kiam la leterportisto alportis la du unuajn kajerojn de tiu Amerika gazeto, kiu same estas destinita por la junularo. Sed kiaj diferencoj inter la du gazetoj! „La Studento“, kvankam nur hektografita, estas pli bele kaj pli plaĉe farita kaj pli ampleksa; tamen „Juneco“ multe superas la Amerikan revuon per stilo, gramatika korekteco kaj eĉ enhavo. „La Studento“ ja enhavas tre instruajn kaj interesajn artikolojn, sed aliaj estas des pli malbonaj aŭ, ni diru, maldecaj por E-ista gazeto, precipe por junulara, ekz. la incitemaj artikoloj kontraŭ la Bolŝevikoj kaj „Judoj“. Ni ne polemiku en niaj gazetoj pri politiko kaj religio, ni restu objektivaj. Cetere, dum la milito ni aŭdis tiom da fabeloj pri „barbareco“, „infera krueleco“, pri „torturoj“, pri „senhonorigo al virinoj“ k. s., ke hodiaŭ oni kredas jam ne la dekonon de tiaj rakontoj.

La barbaroj loĝas kie?
Mondmilito montras: ĉie!

diras tre prave nia Aŭstra s-ano D-ro Pezlederer. Do ni lasu tiajn venenajn artikolojn al la nacia gazetaro, E-istoj ne estu incitantoj kaj ŝovinistoj!

Pri unu grava tempa eraro mi devas ankoraŭ atentigi. Sur paĝo 16 de „La Studento“ oni legas, ke la Haga Kongreso „komencos sept. 1-an kaj daŭrigos unun semajnon.“ Krom la tempa eraro ankoraŭ tri gramatikaj eraroj en unu frazeto! Pli da zorgemo! E-ista gazeto devas esti modela legaĵo, des pli, se ĝi estas porjunulara revuo.

Ĉiukaze „La Studento“ povas fariĝi efika propagandilo por nia afero inter la Amerika gejunularo, sed antaŭe la eldonantoj devas forlasi la vojon politikeman kaj aspiri korektan lingvon. R-ANO.

Esperanto, Bern. Julio-Aŭgusto.
Esperanto Itala Revuo. Aprilo.
Esperanto-Mitteilungen, Graz. Julio.
Esperanto-Praktiko. Julio.
Espero Katolika. Julio.
Franca Esperantisto. Junio, Julio.
Germana Esperantisto. Julio.
La Esperantisto. Junio.
La Espero. Majo-Junio.
La Revuo Orienta. Majo.
L'Esperanto. Majo-Junio.
Nia Folieto. Junio.
Nova Tempo. Junio-Julio.
The British Esperantist. Julio-Aŭgusto.

b) Aliaj Gazetoj.

Esperantida, Bern. Junio-Julio.
Neue Lodzer Zeitung. N-roj 165.

El la enhavo.

En „Esperanto“ de UEA lingva studo de S-ro Lippmann pri la „ismoj“. Sciigo, ke S-ro Hodler testamente donacis al UEA 172000 Fk. Decidoj de la Komitato de UEA.

En „Esperanto-Praktiko“ kaj „Germana Esperantisto“ raportoj pri la Kunveno de Germanaj E-istoj en Eisenach.

La „Espero“ raportas pri la 50-a datreveno de la naskiĝotago de S-ro Nylén kaj pri la Jarkunveno de SEF.

En „La Revuo Orienta“ noto, ke S-ro Ĉikao Fujisaŭa ekveturis de Tokio la 25 Aprilo kiel sendito de la Japanaj s-anoj al la Haga Kongreso.

„Nia Folieto“ enhavas interesan artikolon pri la sukcesplena 9-a Belga Kongreso en St. Gilles.

„The British Esperantist“ kun raportoj pri la 12-a Brita kaj 13-a Skota Kongresoj.

Svisio = io Svisa.

— S-ino F. havas tre bonaju ecojn —
— Edzojn? Ĉu do ŝi estas Mohametana emancipitino?

* * *

— Ho, regas ĉe ni nesuferebla fera disciplino!
— Ĉu oni ne povus liberiĝi de tiu infera discipl-ino?

* * *

— Mia patr-ono nomiĝas Petro.
— Do via patro eble nomiĝas Petr-oblo?

* * *

— Kie vi loĝas?
— En Svis-io.
— Certe, jes? Ĉu do ekzistas Svisa fromaĝo kun tiel grandaj truoj, ke oni trovas en ĝi loĝejon?

Fratoj Stork & K-io
Hengelo, Nederlando
liveras plej diversajn
- Pumpilojn -
Centrifugajn Vaporturbinojn
Suker- kaj aliajn Maŝinojn.
Fabrikejo kun pli ol du mil laboristoj.
Petu katalogon kaj fotojn!
Esperanto korespondata.

Samideanoj, atentu la valoran legaĵon:
La konataj libroj de Iv. H. Krestanoff
La Bulgara Lando kaj Popolo . . 10 Mk.
El la proksima Oriento . . . . . 8 Mk.
Ĉiu kun trikolora etnografia karto, akireblaj ĉe
S-ro Kötz, Germana Esperanto-Librejo
Leipzig, Johannisplatz 3.

„ESPERANTISTA LABORISTO“
Ok-paĝa gazeto, redaktata tute en Esperanto.
Administrejo: 24, Bd. Beaumarchais, PARIS XI.
Jara abono: Francio 5 Fk., aliaj landoj 5,50 Fk.

~ POŜTMARKOJ ~
de **Württemberg'o** (lastaj eldonoj kaj maloftaĵoj), de **Bavario** (Volksstaat, Freistaat ktp.), de **Germanio** (novaĵoj)
estas aĉeteblaj je akcepteblaj prezoj ĉe
Samideano-Filatelisto OTTO WELZEL
51/2, Krämerstrasse, **Reutlingen**, Württ., Germ.
PREZ-LISTON mi sendas al seriozaj aĉetantoj.

ESPERO KATOLIKA. Mi deziras aĉeti je ne tro alta prezo tutajn jarkolektojn aŭ unuopajn numerojn de „Espero Katolika“. — Svitberto J. Degenkamp, Betlehemvojo 56, Utrecht, Nederlando.

KORESPONDO. Feliciano Figueiredo de Carvalho, Flegisto, Calçada de S. Vicente, 21-1, Lisboa [Port.] deziras interŝanĝi korespondadon kun ĉiuj gesamideanoj, ĉiam respondos.

VIRINOJ. Alex. Mexin petas gesamideanoin sendi al ŝi elparolojn, aforismojn ktp. pri virinoj, de iliaj poetoj, verkistoj, ankaŭ popolajn proverbojn pri virinoj. Respondos per poŝtmarkoj aŭ vidaĵkartoj. Adreso: Genève [Svis.], 6, rue Michel-Chauvet.

Ĉiulandaj komercistoj k. industriistoj, vizitu la

3an Internacian Foiron de Frankfurt a. M.

Importo **3-9. Oktobro 1920** **Eksporto**

Prospektoj en 9 Lingvoj kaj en Esperanto. — Korespondado en Esperanto.

Oni petu tuj informojn de

MESSAMT (Esperanto-Fako) Festhalle FRANKFURT a. M. (Germ.)

KONDIĈOJ DE ABONO.

Oni povas aboni ET laŭ tri manieroj:

1. Oni pagu por 50 ekzempleroj de ET (egale ĉu de sama ĉu de diversaj numeroj) 60 stampitajn Internaciajn Respond-Kuponojn, aŭ por 12 ekz. 15 RK, aŭ por 1 ekz. 1½ RK.

2. Anstataŭ per RK oni povas ankaŭ pagi en ĉiuj landoj per Germanaj Markoj. Ni akceptas po 1 Gmk. anst. 1 RK. Do 50 ekz. de ET kostas 60 Gmk., 12 ekz 10 Gmk., 1 ekz. 1,50 Gmk.

3. Tria maniero estas la abonpago per la enlanda valuto de la diversaj landoj.

La precizan abonprezon por la unuopaj landoj montras sekvanta tabelo:

	50 ekz.	12 ekz.	1 ekz.
Por ĉiuj landoj . . .	60 RK aŭ 60 Gmk.	15 RK aŭ 15 Gmk.	1½ RK aŭ 1,50 Gmk.
En naciaj valutoj:			
Anglujo	15/4 Ŝ.	5/4 Ŝ.	4 Pencoj
Belgujo	20 Fk.	5 Fk.	0,50 Fk.
Finnlando	36 Fmk.	9 Fmk.	0,90 Fmk.
Francujo	20 Fk.	5 Fk.	0,50 Fk.
Hispanujo	16 P.	4 P.	0,40 P.
Italujo	24 L.	6 L.	0,60 L.
Nederlando	8 Hfl.	2 Hfl.	0,20 Hfl.
Nordaj Landoj . . .	12 Kr.	3 Kr.	0,30 Kr.
Portugalujo	6 Esk.	1,50 Esk.	0,15 Esk.
Svisujo	16 Fk.	4 Fk.	0,40 Fk.
Usono	3,20 D.	0,80 D.	0,08 D.

Por Germanujo kaj por landoj kun same aŭ pli malbona valuto ni fiksis pli malaltajn prezojn, ĉar en la koncernaj landoj mem la mono havas pli grandan aĉeto-kapablon ol en la plibonvalutaj landoj. Por tiuj landoj valoras jenaj prezoj:

	50 ekz.	12 ekz.	1 ekz.
Germanujo	40 Gmk.	10 Gmk.	1 Gmk.
Por landoj kun same aŭ pli malbona ol Germana valuto . .	48 RK aŭ 48 Gmk.	12 RK aŭ 12 Gmk.	1 RK aŭ 1,20 Gmk.
En naciaj valutoj:			
Aŭstrujo	120 Kr.	30 Kr.	3 Kr.
Bulgarujo	80 L.	20 L.	2 L.
Ĉeĥoslovakujo . . .	60 Kr	15 Kr.	1,50 Kr.
Estonujo	60 E. Mk.	15 E. Mk.	1,50 E. Mk.
Hungarujo	120 Kr.	30 Kr.	3 Kr.
Jugoslavujo	80 Kr.	20 Kr.	2 Kr.
Polujo	100 Pmk.	25 Pmk.	2,50 Pmk.
Rumanujo	60 L.	15 L.	1,50 L.

Ĉiu daŭra abonanto rajtas enpresigi malgrandajn anoncetojn senpage.

Subtenantaj abonantoj krompagas po duona jaro sumon, kiu minimume egalvaloras la prezon por 12 ekz. de ET, il rajtas anonci **grandajn anoncojn senpage** (laŭ la disponebla loko).

La administracio de ET estas preta, malfermi **konton** al la abonantoj. Do oni povas pagi al ni rondan sumon (ekz. 10 Hfl., 20 Ŝil. kip.), kaj ni liveros al la pagintoj tiom da n-roj de ET, ĝis la ronda sumo estos konsumita.

NIAJ ABONEJOJ.

AŬSTRUJO. Karl Bartel, Graz, Schönaugasse 6. Postsparkassen-Konto 186 470.
ĈEĤOSLOVAKUJO. Otto Sklenĉka, Hradec Kralovè.
GERMANUJO. Postscheck-Konto Köln 708 65, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.
HUNGARUJO. P. Balkanyi, Budapest VI, Hajos-utca 15, II.
POLUJO. Ad. Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.
PORTUGALUJO. Silva & Carreira Lda., Lisboa, Rua da Assunçao 42, 3.

NIAJ ABONANTOJ.

Jen estas la dua listo de abonantoj, de kiuj ni efektive ricevis la abonmonon (ĝis 20. Julio). La nomoj de la abonantoj, kiuj jam pagis, sed de kiuj ni ne ankoraŭ ricevis la abonmonon, estas publikigotaj en la sekvonta numero.

La cifero post la nomo signifas, ĝis kiu numero la abono valoras. La litero (S) post nomo signifas, ke la koncerna abonanto estas subtenanta abonanto kaj rajtas anonci senpage grandajn anoncojn.

Köln-Nippes. Brakel 12. — Köln-Müllheim. de Haas 12. — Henkenhagen. Winsch 5. — Stuttgart. Christaller, Böning, Hofmann 12. — Sofia. Kolev (S) 18. — Breslau. Schilk, Wollmann, Fiegert 11. — Bergstein. Decker 11. — Danzig. Tuschinski 12. — Breslau. Sedlag, Spanke 11. — Werdau, E-grupo „Obstine antaŭen" 11. — Echterdingen. Müller 50. — Chemniţ. Claus, Kirchner 11. — San Francisco. v. Sloun, Vinzent 24. — Marseille. Marius 28. — Béziers. Roksano 27. — Philadelphia. Vidikauskas 15. — St. Gilles. v. Aelst 24. — Milland-Brixen. Rothwallner 12. — Leek. Wilson 12. — Zürich. Schacht 50. — Köln-Deuţ. Wilbert 12. — Breslau. Luţin 11. — Nürnberg. Pilholer 11. — Haag. Balthuis 25. — Buer. Towet 50. — Hattingen. Sahler 24. — Stolberg. Faber 24. — Gefle. Skog (S) 50. — Krakow. Dabrowski 15. — Offenbach. Gumbinger 5-loje 12 — Auerbach. Nestler 12. — Gera. Ostermann, Hezel, Schneider, Schmidt, Sieler 4. — Essen. Klein, Reuss 12. — Elberfeld. Weber 11. — Wipperfürth. Esser 11. — Edinburgh. Clayton (S) 56. — Lisboa. Figueiredo de Carvalho 16.

Ĉe niaj abonejoj abonis: Graz. Bartel, Halbedl, Mader, Hackl po 10. — Budapest. Kürschner, Hevesi, Kalocsay, Felsenfeld (S), Szabo po 10. — Felsöpulya. Boda 11. — Smichov. Podlipsky 12. — Saaz. Süsser 12. — Pardubice. Poppe 12 — Moravany. Berger (S) 12. — Hradec Kralove. Charvat, Jelinek 12.

Pensiono „Erika"

Luksaj loĝejoj, tre malkaraj por eksterlandanoj [ĉar Germ. valuto]

Baltika Marbanejo Warnemünde

Strandweg 12 a. — Wilh. Scheel, Del. de UEA.

Telefono 147.

Kontraŭ kolekto de 30 malsamaj poŝtmarkoj de ekster-Eŭropaj landoj (ne Usonaj) mi sendas saman nombron Bulg. poŝtmarkoj; kontraŭ 40 poŝtmarkoj — 5 belajn vidajkartojn de Bulgarujo. La kolekto konsistu el kompletaj aŭ duonserioj de poŝtmarkoj. Oni sendu per rekomendita letero al:

Panajot At. Kolev, Sofia (Bulg.)

str. Regentska 19.

Stampilojn

kaj emajl-elpendaĵojn ĉiuspecajn kaj por ĉiuj celoj liveras prezinde

Stampil-Fabrikejo Robert Pfennigwerth

Hirschfelde (Saksujo, Germ.)

Centra Librejo „Esperanto"

Bul. Marie Luiza Nr. 46 **Sofia (Bulg.)** Bul. Marie Luiza Nr. 46

— Ĉiuspecaj oficejaj kaj lernejaj komercaĵoj. — Artaj bildoj, poŝtkartoj, legolibroj. Esperantaj lernolibroj, literaturaĵoj. — Abonejo por ĉiuj Esp. kaj ne-Esp. gazetoj. —

VINJETOJ!

glu-markoj, gumo-stampiloj, sigeliloj, div. gravurlaboroj [plej bona ellaborado] liverataj de

S-ano Rudolf Felsenfeld

Budapest (Hung.) V.

Bálvány-u. 16.

S-ro James A. Meagher, 12 Westmoreland Street Dublin (Irlando) plezure klarigos la tutan

Irlandan Problemon!

Ĉu vi interesiĝas pri ĝi?

Komerc-Agentejo

de

Dipl.-Ing. P. Tarnow, Kiel (Germ.)

Olshausenstr. 18

prizorgas ĉiajn maŝinojn kaj teknikajojn.

Specialajoj:

Foder's ŝpar-kuirplatajoj

por ĉiu elektra tensio (110 kaj 220 Voltoj tuj livereblaj,

Lavtabulajo kun zink-lamena enmetajo.

Tre moderaj prezoj. — Pogrande speciala rabato.

Por la propagandisto, studanto de lingvoj Angla kaj Esperanta kaj aŭtoro de etimologiaj kart-ludoj:

„Angla kaj Esperanta Etimologio."

Charles G. Stuart-Menteth, BA (Oxon)

(en lingvoj Angla kaj Esperanta.)

„Interesa novspeca pruvilo por la internacieco de nia lingvo (Esperanto)." *Nia Folieto, Gent.*

Prezo: 4 Respond-kuponoj, afrankite.

B. E. A. 17, Hart Street. W. C. 1, London.

Muscat & Christlein

Nürnberg (Bavarujo)

Bank-Konto:

Dresdner Bank Filio Nürnberg

Postscheck-Konto:

— — Nürnberg 106 85. — —

Telegraf-Adreso:

Muscat Christlein Nürnberg.

Telefono 11 047.

Esperanto korespondata.

Helpo!

La „Laborista Esp. Grupo Genova", kiu fondiĝis la 26 Marto 1920 por ekstarigi Bibliotekon, petas ĉiun personon, societon, redakcion ktp., bonvolu sendi al ni donace Esp. librojn, gazetojn, broŝurojn, ĉian Esperantaĵon ktp. por la ekriĉigo de nia biblioteko. Al ĉiu donacanto kore ni esprimas niajn plej samideanajn antaŭdankojn. Bonvolu ĉion adresigi al la Sekretario kaj Kasisto de la „Gruppo Esperantista Operaio", S-ro ETTORE MANAGLIA, Casella Postale 922, en Genova (Italujo).

Revelanoj, ne forgesu,

ke Dimanĉon, la 19-an de Septembro, okazos la

Revelo-Tago en Düsseldorf!